

Augustin Wibbelt,  
La lastaj rozoj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Jen falas arb-foli',  
Ne movis sin venteto.  
En hela sun-radi'  
La ruĝaj rozoj ardas.

La mondo estas ja  
Ankoraŭ tiel bela.  
Translasu ĉion nur  
Al la decid' ĉiela.

Jen falas arb-folio,  
Kaj sinkas jam la Sun',  
Ĉe l' roz-arbedo floras  
La lastaj rozoj nun.

*Traduko de la Basgermana poemo "De lesten Rausen" de AUGUSTIN WIBBELT (\*1862-09-19 – †1947-09-14)  
en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2012-09.*

*MR-540-1 / Arg-601-1212 (2013-03-04 11:42:23)*